1-a ★ R.R.

“Rata ★ Rendevuo”

14-a de novembro 2004

La Ratkaptista Bando el Hameln invitas vin al Hessisch Oldendorf. Ni esperas, ke ni povas ĝui kun niaj najbaraj Esperanto-grupoj kaj -amikoj espereble belan tagon en bona etoso.

La programo:

12.00/12.01: Trajnoj alvenas. Ni renkontiĝas ĉe la **stacidomo** en Hess.Oldendorf

ĉ. 12.10: komuna **tagmanĝo** en restoracio(j) laŭplaĉe (ĉina, itala, germana, ktp.).

13.40: ni kolektiĝas ĉe la “Baxmannbrunnen” sur la „**Marktplatz**“ kaj ekiras per aŭtoj al Langenfeld.

ĉ. 14.00/14.15: gvidata **vizito de la Schillat-kaverno** ĉe la vilaĝo Langenfeld. Estas stalaktita kaverno, inaŭgurita por turistoj nur en aŭgusto 2004. Kulmino de la vizito estos la 3-D-diapozitiva prezentaĵo de la najbara Riesenberg-kaverno, la plej granda en norda Germanio, sed ne alirebla por homoj. Daŭras ĉ. 1 horo.

Poste: ebleco por **promeni tra la aŭtuna arbaro** kaj **trinki kafon** kaj **manĝi kukon** tuj apud la ŝtonminejo; tempo por babili; reveturado al Hessisch Oldendorf.

17.30: en la “**Werkhaus**” Hess.Oldendorf, Lange Straße 90: diapozitiva **prelego pri la UK en Pekino kaj vojaĝo tra Ĉinio**. Prezentos ĝin kaj parolos Reinhard Burgmann el Hildesheim kaj Josefa Krumme el Flakenholz. Ĝi okazos en germana lingvo, ĉar ankaŭ ne-Esperantistoj estos invitataj. Daŭras ĉ. 2 horojn (kun paŭzo). **Poste:** babilado, kantado kaj adiaŭo.

Kostoj: en restoracioj ĉiu pagas mem; bileto por la kaverno kostas 6 € (en grupo kun minimume 15 pers. nur 5 €); prelego estas senkosta, sed donacoj estas bonvenaj.

Bonvolu aliĝi ĝis la 5-a de novembro ĉe: Heinz W. Sprick, Schmiedeecke 2, 31840 Hessisch Oldendorf, Email: hameln@esperanto.de ; Telefono (ankaŭ dum la “Rata Rendevuo” mi estos atingebla per tiu-ĉi numero, se iu perdas la grupon): **0162/7536396** (bonvolu atenti: inter la 9-a kaj 17-a de oktobro mi ne estos atingebla pro ferioj)

Pliaj informoj ankaŭ ĉe: www.esperanto.de/hameln

La lokoj kaj la vojoj:

Aliĝilo:

Nomo: …….

Alveno: ☐ Mi venos trajne. ☐ Mi bezonas kunvetureblecon al la kaverno en aŭto .

Mi venas : ☐ je la 12-a horo ☐ poste, je la ……. -a horo

Mi preferas manĝi en: ☐ ĉina ☐ germana ☐ itala ☐ …… restoracio.

La vizito de la Schillat-kaverno: ☐ Mi partoprenas ĝin. ☐ Mi ne volas partopreni ĝin.